# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

N-ro 4/1996 JULIO-AÙGUSTO

**LA REGIONA SEMAJNFINO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO** okazos la 7-an kaj 8-an de septembro 1996 en **CULLY**, apud Lausanne.

**ĈEFA PRELEGO:**
"RENKONTIĜO KUN **GERRIT BEVERLING**; kiel poeto, tradukisto kaj teologo".

Gerrit Beverling, nederlandano, naskita en 1944, estas vicprezidanto de la akademio de Esperanto, prezidanto de EVA, (Esperantista Verkista Asocio) kaj redaktoro de FONTO. Edzo, patro kaj avo; li havas larĝan kulturan intereson; mezlerneje instruis 14 jarojn pri historio ĝenerala kaj klasikaj lingvoj; li laboras 12 horojn kiel pastoro en liberkristanaj komunumoj; esperantisto depost 1972, li estas poeto, tradukisto kaj proz-aùtoro de pli ol 40 libroj kaj libretoj.

Kiel kutime disvolviĝos paralele du grupoj: grupo de komencantoj gvidata de Lucienne Dovat, kaj grupo de progresantoj kun la instruado de Alain Favre.

Aliĝilo kun pli detalaj informoj estos sendata al ĉiu membro de SES. -NM-

Pliajn informojn donos NICOLE MARGOT
ch. des Lys 4
1010 Lausanne

TEL 021/653 14 67

oo0oo

## G R U P A J   I N F O R M O J

**BELLINZONA:**
Ni kunvenas ĉiam la 2-an sabaton en Viale Motta 32, 6500 Bellinzona.
*13.7.17.00h  kaj  6.8.17.00h*

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
2.7.19.30h  kaj  6.8.19.30h

**ESPERANTORONDO BIELO:**
En restoracio MIGROS, Neumarkt, Bielo 3, ĉiun ĵaŭdon 18.00-19.00h.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO/LES:**
En restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse8 en Emmenbrücke, (kun escepto de BIG BEN).
13.7.20.00h ekskurso.
Somera paŭzo. (Se vizitas vin Esperantistoj, bonvolu provi organizi kunvenon).
29.8.20.00h LA EN TUNELE ŜVEBANTA FERVOJO DE SERVAUS. (Aerkusena fervojo) Parolos Anne-lies Dettling.

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Untere Bahnhof-strasse 18.
10.7. Ekskurso: Renkontiĝo en Oberuzwil, Dorfplatz (vilaĝplaco), je la 18.30h.
En aŭgusto neniu aranĝo.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
En la propra kunvenejo en Eisengasse 22.
15.7.19.15h  (lundo). Monata kunveno, Somerfesteto.
26.8.19.15h Lingvaj ekzercoj kaj libera kunveno.

oo0oo

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**

La ĝenerala kunveno okazis la 8-an de marto 1996.Same kiel ĝis nun nia kutima agado estas kompari niajn hejmfaritajn tradukojn kun bona publikita traduko france-esperanten.Ni kunvenis 9 foje. Mi dankas sinjoron R. W. Perrenoud, kiu tre afable tajpis kaj sendis la kunvokilojn kun la teksto tradukenda, kaj disdonis la publikitan tradukon, kiun li ankaŭ tajpis. La unuan de decembro ni havis nian Zamenhofan feston. Ni manĝis bonan rakledon kun diversaj aldonaĵoj alportitaj de ni ĉiuj.

La raporto kaj la kontoj estis akceptitaj kaj la komitato restas la sama. Ankaŭ la kotizo ne ŝanĝiĝis.

La prezidanto
Alfred Wenger
En Séraize 19
2025 Chez-le-Bart

TEL 038/55 25 20

Ek de la 9-a de novembro 1996 la nova numero estos: 032/835 25 20.

oo0oo

**M O R T - A N O N C O**

La SES-membro sinjorino Elvine LEUTERT-FREYMOND, 32 Bd Hélvetique, 1207 Genève, mortis, 46-jara, en la kantona hospitalo de ĝenevo.

La SVISA ESPERANTO-SOCIETO kore kondolencas al la funebra familio.

oo0oo

**BIBLIOTHÈQUE DE LA VILLE DE LA CHAUX-DE-FONDS**

CENTRE DE DOCUMENTATION D'ÉTUDE SUR LA LANGUE INTERNATIONALE
CENTRE CULTUREL ESPÉRANTISTE

2e Colloque international d'interlinguistique -
2a Internacia Kolokvo interlingvistiko
CDELI, La Chaux-de-Fonds (Suisse) 2-3.11.1996.

Thème - Temo:
Domaines de l'interlinguistique appliquée. Esplorkampoj de aplikita interlingvistiko.

Organisateurs - Organizantoj:
CDELI(Centre de Dokumentation et d'Étude sur la langue internationale), Bibliothèque de la ville, Progrès 33, CH-2300 La Chaux-de-Fonds (Svislando)

Premier relateur - Ĉefprelegonto: Dr. sc. Detlev Blanke, Berlino.

Lieu - Loko: Bibliothèque de la ville, Progrèa 33, CH-2300 La Chaux-de-Fonds.

Frais de participation - Aliĝkostoj:
Pour les deux jours - por ambaŭ tagoj: CHF 30; étudiants, 3° âge, et participants au cours d'interlinguistique - por studentoj, 3-aĝuloj kaj kurs-partoprenantoj: CHF 25. Gratuit pour ceux qui présenteront une contribution. Senpage por prelegontoj.

2e Cours d'interlinguistique - Dua Kurso pri Interlingvistiko, CDELI, la Chaux-de-Fonds(Suisse), 4-6. 11. 1996.

Thème - Temo:
Fontoj kaj ĉefpunktoj de interlingvistiko laŭ CDELI-dokumentoj.

Enseignants - Kursgvidantoj: C. Gacond("Kial subite kolapsis Volapük?"), Tazio Carlevaro("Ŝati Idon - Aimer l'Ido")

Lieu - loko: Bibliothèque de la ville, Progrès 33, CH-2300 La Chaux-de-Fonds.

**Frais d'inscription - Aliĝkotizoj**

Kurso CHF 30 je tago; CHF 75 la tri tagoj kune, Studentoj kaj 3-aĝuloj: resp. CHF 27 kaj 68. Kolokvo CHF 30; studentoj, partoprenintoj al la kurso, kaj 3-aĝuloj CHF 25.
Senpaga por sciencaj kontribuantoj.

**Nous vous invitons à contribuer - Ni alvokas vin al scienca kontribuo.**

**Adresse, correspondance, informations - Adreso, korespondo, informoj**

I Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, 6500 Bellinzona (Svislando) Tf++41 91 8252988;
Fx ++41 91 8259559


Poŝtĉekkonto: CDELI, La Chaux-de-Fonds, 23-6008-0.

oo0oo

**"LA LINGVOJ KAJ TIES BILDOJ"; KOLOKVO OKAZINTA EN LA UNIVERSITATO DE NEUCHÂTEL, SVISLANDO, EN MARTO 1996.** (Rigardu en SES INFORMAS 2/96/red).

Inter 41 laborgrupoj okazis du pri Esperanto. Claude Piron kaj Lily Papaloizos raportis pri la bildoj, kiujn havas la vasta publiko pri Esperanto, pri la realeco,kaj finfine ili analizis la distancon inter tiuj du starpunktoj kaj la kialojn de tiuj oftaj antaŭjuĝoj.Ĉeestis po proksimume dudek personoj, inter aliaj estis du famaj lingvistoj svisaj, Bernard Py kaj Georges Lüdi, kiujn la decidpovaj instancoj konsultis pri fremdlingvoinstruado. -MG-

oo0oo




# C A L E L L A, URBO DE NIA ESPERANTO-SEMAJNO

(okazos 5.10.-12.10.1996.)

Precipa turisma urbo en la konata "Costa del Maresme" =(Marbordo "del Maresme"), ĝi estas grava turisma centro por feriado. Kun ampleksa strando, el dika sablo, kies longeco estas tri kilometrojn longa

Calella havas eksterordinaran hotelreton kaj tendumejojn, en la urbo abundas distrejoj kaj amuzejoj, kun la fama "Festo de la biero", laŭ la Munkena stilo kaj tradicio.

Calella fariĝis unu el la plej gravaj lokoj por la eŭropa turismo.

Ĝia pejzaĝo klifa, kun vertikalaj rokaroj, fare de la fortaj marondoj, donas la unuan bildon de la proksima "Costa Brava" =(Klifa Marbordo). Tre karakteriza en Calella estas ĝia lumturo inaŭgurita en la jaro 1859, situanta en la promontoro, je la enirejo al la urbo.

Estas vizitindaj la paroĥa preĝejo "Sankta Maria", konstruaĵo neoklasika kun portiko baroka, la "Domoj, Giol, Bartrina, Galcerán kaj Sivilla," sen forgesi la kapelon de "Sankta Quirze kaj Sankta Tulita".

Tre interesa estas la muzeo-arkivo kaj pinakoteko "Gallard". Klopodu viziti la Parkon "Dalmaŭ" parko kun ampleksaj ĝardenoj, pergoloj kaj arbara zono. Ĝi estas alloga ripozejo post tutataga restado en la strando.

(Aliĝilo ricevebla ĉe SES INFORMAS)

## H E R O L D O  DE  E S P E R A N T O

### NOVA GERMANA LERNOLIBRO:

Post trijara preparlaboro, post kelkaj monatoj aperos la elstara lerno-lego-libro por germanlingvanoj "ESPERANTO EINE NEUE BRÜCKE ZUR WELT" de d-ro Till Dahlenburg. Ĝi estos samtempe taŭga por komencantoj kaj por progresantoj.

La nova 256-paĝa verko (135 desegnaĵoj kaj 72 enkadrigitaj tekstoj) baziĝas sur la plej aktuala lingvo-pedagogia metodiko kaj konsistas el 15 lecionoj kun vortareto, ŝlosiloj, bibliografio, antologio, informoj pri la praktika apliko de Esperanto en diversaj fakoj, informoj pri la Esperanto-gazetaro kaj -literaturo, adresaro de la Movado en Germanio, Aŭstrio kaj Svislando, k.t.p. La verko estas destinita al kursanoj kaj memlernantoj, sed ankaŭ spertaj Esperantistoj trovos intereson en ĝi.

Eldonos la verkon **"HEROLDO DE ESPERANTO"**, kiu sukcese jam aperigis modernajn lernolibrojn en la franca, hispana kaj itala (ĉiuj atingis du eldonojn) kaj la perfektigan kurson **"Paŝoj al plena posedo"** de William Auld (ses eldonoj: kune ĉ.30 000 ekzempleroj).

-Ada Fighiera Sikorska-

## ESPERANTO-GRUPO "LA STELO" GENÈVE

### SOMERE NI NE PAŬZOS:::

...sed ni renkontiĝos por senformala babilado kaj trinkado en la kafejo de Ile Rousseau, la sabatojn 29an de junio kaj 17an de aŭgusto, je la 15-a horo. Se pluvas, la rendevuo okazos samhore, en la apuda restoracio Lacustre (quai Général-Guisan.) -La brasikfolio-

PP
8053 Zürich

Krakowskie Towarzystwo
ESPERANTO

La membroj de la **KRAKOVA ESPERANTO-SOCIETO** deziras korespondi kun Esperanto-Societoj en Svislando. Esprimante viajn temo-dezirojn skribu al:
Krakova Esperanto-Societo, Demo-Kultura "Podgorze"
ul. Ignacego-Krasickiego 18/20, 30515 Krakovo.

Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 5/96
estas la 6-a de aŭgusto 1996.

**Red-Adreso: Fritz Liechti Wiesliacher 17
8053 Zürich. Tel: 01/381 77 13**